

Pilo-Press kaj la teatraĵo *La Reto* de Bukar
Claude Gacond, 418-a radioprelego, 1971.10.13 & 16

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Pilo-Press, la Internacia Informservo, kiun iniciatis kaj gvidas sinjoro Ludwig Pickel en Nürnberg, Germanio, kaj kiu sendas ĉiusemajne freŝdatajn novaĵojn pri la esperanto-vivo al la redaktoroj, kronikistoj kaj informemuloj, anoncis, ke en Parizo okazas sensacio. Jen tiu novaĵo, kiel ni ĝin ricevis :

A.- « *Parizo. Ŝajne Parizo kiel kultura centro de Esperanto revekigos kaj religos kontaktojn al la antaŭmilita tradicio de la « Verda Kato ».* Ĉiukaze venas la ĝojiga informo, ke de la 16-a de novembro ĝis la 5-a de decembro 1971 ĉiutage escepte de lundo estos ludata la nova Esperanto-teatraĵo **La Reto** de Bukar en la teatro **Absidiolo**, 5 Frédéric Sauton strato. La teatro troviĝas najbare al la Sorbone ĉe bulvarado St. Germain. La teatraĵo mem, verkita de Pariza esperantisto sub la pseŭdonimo Bukar, temas pri sekretaj pensoj de patrino kaj filino en malĝojiga atmosfero de spicejeto, kie la filino, superregata de la patrino, estas kaptita kiel « fiŝo en la reto ».

Cl.- Sekvas frazo nekomprenebla pro tre verŝajne tajperaro, kaj poste bibliografia noto bedaŭrinde nekompleta, ĉar la eldonejo ne estas menciita. Tiuj nekompletaj bibliografiaj informoj, kiujn iniciatis UEA kaj kiujn imitas libro-servoj, estas kritikendaj. Ili estas unue maldankemaj al la eldonejoj mem, kiuj ofte laboras en financaj malfacilaĵoj por aperigi novajn literaturaĵojn. Due ili havas malaltnivelan komercan aspekton, provante forigi ĉe la publiko la emon sin komplete informi. Ni ne opinias, ke la libro-servoj perdos multajn klientojn, se ili donos kompletajn bibliografiajn informojn.

A.- Post tiu kritiketo, jen kiel prezentas tiun teatraĵon *La Reto* la eldonejo mem, kiu estas Dansk Esperanto Forlag en Aabyhøj, Danlando :

Cl.- « *Oficisto estas sendita de Pariza asekura kompanio al vilaĝeto en Centra Francujo, por anstataŭi la lokan agenton, kiu ĵus mortis pro akcidento.*

A.- *La sola hotelo de la vilaĝo estas nun malkonstruata. La oficisto estas devigita lui malkomfortan ĉambron super spicejeto, kie vivas maljuna vidvino kun sia kripla filino. Al tiu ĉi plaĉas, ke viro ekloĝas en la domo... Sed li ĉefe zorgas pri la morto de la loka agento ; ĉu estis akcidento... aŭ murdo ?*

Cl.- *Tamen, tio ne estas... polica teatraĵo. La enketo farita de la asekura oficisto servas nur por ebligi, ke la personoj de ĉi tiu dramo montru siajn sekretajn pensojn. Kaj, iom post iom, ni malkovros la etoson de la butiketo inter estr-ema patrino kaj la filino, al kiu neevitebla fato ŝajne malhelpas ĉiujn provojn por liberiĝi el la patrino super-regado ; ŝi estas kaptita en tiu mizera vivo, kiel fiŝo en reto.*

A.- *Iam ŝi sukcesis foriri ; sed, post kelkaj monatoj, ŝi estis devigita reveni hejmen, kripla, ne plu povante esperi liberecon. Tamen, la asekura oficisto proponas al ŝi la eblecon forkuri el la malĝojiga etoso de la spicejeto. »*

Cl.- Ni estas tre ĝojaj, ke pariza grupeto, formata de kvin roluloj, sin riskas prezenti ĉiutage teatraĵon en esperanto. Ni mem ĉeestis la kongreson de Sennacieca Asocio Tutmonda en Parizo, kaj ĉe la beletra vespero ni povis konstati, ke la salonego pleniĝis je centoj da parizanoj, kiuj venis por aŭskulti la recitadon de Rytjkov kaj la kantadon de Ramona. En Parizo tutcerte ekzistas esperanto-elito preta apreci kaj kuraĝigi la provojn de teatra grupeto. Almenaŭ ni esperas tion, por ke tiu eksperimento havu pozitivajn sekvojn kaj religu kontaktojn, kiel diris Pilo-Press, kun la antaŭmilita tradicio de la **Verda Kato**, kie talentis Raymond Schwartz.

Pilo-Press kaj la teatraĵo *La Reto* de Bukar
Claude Gacond, 418-a radioprelego, 1971.10.13 & 16

Cl.- Eklegante tiun teatraĵon *La Reto*, oni tuj havas la emon daŭrigi la legadon. Tio estas pruvo je teatra kvalito. La rigardantoj havos ion por rigardi, ĉar la agoj rapidas. Stile, tiu verko estas tutcerte konvena por teatroludo. Ni bedaŭras ne loĝi pli proksime de Parizo, por povi foje iri vidi, kion faras la kvin roluloj kun tiu 32-paĝa kaj triparta teatraĵo.

A.- Por doni al vi la emon aĉeti tiun libreton, la venontan semajnon ni legos al vi la komencon de tiu teatraĵo *La Reto*. Hodiaŭ ni prezentos al vi ĝiajn kvin rolulojn.

Cl.- La ĉefaktoro estas Hans Kegel, oficisto ĉe la asekura kompanio ZEUS ; ĝentila, vestita kiel decas al asekuristo.

A.- La ĉefaktorino estas Monika Paccourd. Ŝi estas 28-jara unubrakulino, simplevestita. Ĝia vizaĝo montras konstantan malĝojon ; ŝia voĉo estas morna, sen ĉarmo ; tuj kiam oni ekvidas ŝin, oni divenas, ke tiu senkolora, monotona vivo en la kampara spicejeto, meze de senviva vilaĝo, alportas al ŝi neniun ĝojon ; ŝi nur daŭre vivas.

Cl.- Ŝia patrino estas 60-jara. Ŝi estas vestita kiel la filino.

A.- Aperas du kromaktoroj : leterportisto kaj vinportisto.

Cl.- La aŭtoro donis tre detalajn klarigojn. Li tutcerte verkis pensante, ke lin ludos amatoraj grupetoj. Se en via esperanto-rondo vi estas kelkaj anoj, kial ne legi tiun teatraĵon. Poste vi povos babili pri ĝiaj kvalitoj kaj mankoj. Kaj eble, kial ne, vi povos provi ĝin ludi.

A.- Ni ripetas la titolon de tiu verko: *La Reto*. Aŭtoro : Bukar. Eldonejo : Dansk Esperanto Forlag.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-